

UNUA BULTENO

de la 39-a Pola Esperanto-Kongreso en Łódź, 23-26.06.2022

Organizantoj: Pola Esperanto-Asocio – Ĉefa Estraro, Filio de PEA en Łódź, Kulturdomo de Łódź

Tempo: 23.06.2022 (ĵaŭdo) – 26.06.2022 (dimanĉo)

Aliĝkotiĝo ĝis 31.05.2022	
PEA- membroj	Ne PEA-membroj
40,00zł.	50,00zł.
Aliĝkotiĝo post 31.05.2022 kaj surloke	
PEA-membroj	Ne PEA-membroj
50,00zł.	60,00zł.



ŁÓDŹ · 23-26.06.2022

Aliĝiloj kaj kontaktoj: www.esperanto.pl
Robert Kamiński, rk-lodzo@wp.pl
Zofia Śmistek, zosiasmistek@wp.pl
<https://eventaservo.org/e/300538>

Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio kore invitas al la 39-a Pola Esperanto-Kongreso. Post paŭzo en jaro 2020 kaj komuna Virtuala Pola Germana Esperanto Kongreso sekva kongreso okazos en Łódź, kie PEK okazis jam multfoje antaŭ la dua mondmilito kaj ankaŭ dum lastaj jardekoj.

Kongresejo:

La ĉijara kongresejo estos la Kulturdomo de Łódź (ŁDK) kiu estas ĉefa Kultura Instituto de la Vojevodio Registaro, kaj troviĝas ĉe la strato Traugutta 18 (apud stacidomo Łódź Fabryczna).

En la kulturdomo de multaj jaroj troviĝas sidejo de lodza filio de PEA. Pola Esperanto-Kongreso (jam kvara organizita en ĉi-tiu loko) okazos sur tri etaĝoj - akceptejo ĉambro 102, ĉefsalono ĉambro 212 - loko por Ĝenerala Kunsido de PEA-membroj ĉambro 313. La kulturdomo havas kelkajn liftojn, kaj ekipaĵon por handikapuloj (ŝtupara lifto ĉe enirejo).

Skiza programo:

23.6.2022 ĵaŭdo

8:00 - 18:00 - tuttaga ekskurso „Ligna arkitekturo ka antikvaĵooj de lodza vojevodio”.
(kun tagmaĝo)
19:00 - vespera renkontiĝo en tranoktejo

24.6.2022 vendredo

10:00 – malfermo de la kongreso, prelegoj.
14:00 - 15:00 - manĝopaŭzo
15:30 - 18:00 - programo, vizitado de la urbo.
18:00 - 21:00 - arta programo

 **ŁÓDZKI DOM KULTURY**
INSTYTUCJA KULTURY SAMORZĄDU WOJEWÓDZTWA ŁÓDZKIEGO



Pola Esperanto-Asocio
Polski Związek Esperantystów

25.6.2022 sabato

9:30 - 14:30 Ĝenerala PEA-kunsido (raporta kaj elekta).

14:30 - 16:00 – manĝopaŭzo

16:30 – 18:00 – programo, ebla E-diservo

18:30 – 21:00 – arta programo

26.6.2022 dimanĉo

10:00 - 12:00 - prelegoj, resumo de la kongreso, fermo.

13:00 - 14:00 - manĝopaŭzo,

14:00 - vizitado de la urbo

Tranoktejo:

Lerneja Junulara Gastejo (PTSM) ĉe la str. Zamenhofa 13.

Distanco inter la gastejo kaj la kongresejo 1,5 km – piede 19 minutojn, per aŭto 5 min.

La Lerneja Junulara Gastejo en Łódź konsistas el du domoj situantaj en la centro de la urbo. Unu ĉe la str. Zamenhofa 13 kaj dua ĉe la str. Legionów 27.

La gastejo situas en deknaŭjarcenta loĝdomo, plene renovigita. Ĉiuj ĉambroj en la gastejo estis renovigitaj kaj ricevis modernan aspekton.

La plej populara kaj vigla strato Piotrkowska estas atingebla de la tranoktejo en nur 5 minutoj piede.

La ŝirmejo havas 49 litojn en 22 ĉambroj: 5 unupersonaj ĉambroj, 9 dupersonaj ĉambroj, 6 tripersonaj ĉambroj, 2 kvarpersonaj ĉambroj.

La ĉambroj situas sur la dua kaj tria etaĝoj de la konstruaĵo kaj estas ekipitaj per lavujoj, komfortaj litoj, nokttabloj, lampoj, televidiloj, radio, vestoŝrankoj, tabloj kaj seĝoj. Plena sanitara instalaĵo situas en la koridoroj kaj aldone sur la teretaĝo.

Gastoj havas je sia dispo: • manĝoĉambro, trejnejo por 40 personoj • plene ekipita memserva kuirejo • WiFi • turisma lavejo • stokado de pakaĵoj, • ĝardeno • interna parkejo por personaj aŭtoj kaj edukaj ludoj, dosierujoj, broŝuroj, gvidiloj pri Łódź kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.

Ekzistas parkejo kaj ĝardeno kie vi povas malstreĉiĝi de la tumulto de la urbo. Ene de la konstruaĵo, la koridoroj, akceptejo, komunĉambro, kuirejo, pakaĵĉambro, sanitaraĵoj, lavejo, hejtadejo estis renovigitaj.

Prezo: 55 zlotoj po nokto/persono



Ekskurso: "Ligna arkitekturo kaj antikvaĵoj de la Lodza Vojevodio" la 23.06.2022 **Prezo:** 90,00 zlotoj kun tagmanĝo. **Deviga antaŭpago** ĝis 31-a de majo.
Ekskursgvidanto: Elżbieta Pędziwiatr.

Skiza programo de la ekskurso

9:00 - 9:30 - foriro el Łódź de antaŭ kulturdomo

11:00 - 12:00 - vizito de la larika palaceto de nobelulo en Ożarów

12:00 - 13:00 - vizitado de historiaj lignaj preĝejoj en la najbareco de Ożarów en vilaĝoj Kadłub, Gaszyn, Wierzbie, Grąbień

14:00 - 14:30 - vizito en Wieluń


14:30 - 15:30 - tagmanĝa paŭzo

16:00 - vizito de Zelów. Renkontiĝo kun reprezentantoj de la evangelika grupo *de ĉeĥaj fratoj* (aŭ koncerto de „Zelów-Sonoriloj”)

18:00 - depende de la tempo ebla rigardo la minejo de bruna karbo en Bełchatów kaj vizito urbo Pabianice.

18:30 - 19:00 - reveno al Łódź





Centro de Łódź

← Nordo

← Kongresejo
str. Traugutta 18

← Tranoktejo
str. Zamenhofa 13



<https://www.facebook.com/Esperanto-w-%C5%81odzi-198751680901724>